

KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 40-a BRAZILIO, OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO 2015 N-ro 160

“Amu vian Dion per via tuta koro
kaj per via tuta animo kaj per via tuta
menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”
JESUO (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte
rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo.*
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante
unu la alian, la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.”
ZAMENHOF. *La Espero.*

Kia Bela Jubileo!



La 12-an de Decembro 2015, ĉe la Historia Sidejo de Brazila Spiritisma Federacio, en Rio-de-Janeiro, ELDONEJO LORENZ festis sian 40-JARAN JUBILEON en tre agrablaj kaj fratecaj etoso.

La programo, gvidita de Ismael Miranda e Silva, estis tre riĉa kaj komenciĝis per preĝo kaj tuj post oni kantis la esperantan himnon. En la sekva paŝo, Affonso Soares, Prezidanto de la Konsilantaro de Lorenz, prelegis pri la 40 jaroj da laborado de la Eldonejo por EVANGELIO, SPIRITISMO, ESPERANTO. Koncerne la Artan Momenton, Neide Barros Rêgo, Graça Thuler kaj la Koruso de Leme bele prezentis kanzonojn kaj poemojn.

Alia grava momento de la festo estis la ĉeesto de la veteranoj Benedicto Silva (88), Alberto Flores (92), la mediumino Brunilde Mendes do Espírito Santo (93) kaj ankaŭ de la juna Sandro Moreira Alves, Prezidanto de Brazila Asocio de Esperantistoj-Spiritistoj, kiuj trandonis stimulaĵajn mesaĝojn al la ĉeestintoj kaj gratulojn al Eldonejo Lorenz.

Por fini la feston kun ora ŝlosilo, la Spirita Mondo, per la mediumeco de Geralcino Gomes, Direktoro de la Eldonejo Lorenz, ricevis psikografian mesaĝon de la Spirito Manoel Fernandes pri laborado de la Eldonejo dum tiu longa periodo. Por fini la Eventon, Danilo Villela, ano de la konsilantaro de Lorenz, preĝis. Gratulojn al ĉiuj kaj ni laboru por aliaj 40 jaroj! ★





Ĉinnumero de KOMUNIKOJ omaĝas la senlakan brazilan laboranton, veteranon, poligloton, kunlaboranton de nia Eldonejo, BENEDICTO SILVA (88), nia kara Frato kaj kompetenta tradukisto. Vidu flanke pecon de lia laboro, la traduko de la verko "La Konsolanto".

El la intervjuo kun Benedicto Silva en ALMANAKO LORENZ 2016:

— Kion reprezentas Esperanto por via vivo?

"La fakto, ke mi eklernis Esperanton en 1945 kaj restas ĝis nun en la movado, pravas, ke tiu internacia lingvo — kvazaŭ granda ponto aŭ fortaj flugiloj, ebligantaj al mi vojaĝi tra la mondo kaj kunfratiĝi kun homoj de ĉiuj rasoj kaj nacioj, — signifas por mi grandan favoron de Dio."



KUNLABORU! – Membriĝu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

COLABORE! – Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!

Ĉu estas juste, ke ni rigardu ĉiujn homojn kiel mediumojn?

"Ĉiuj homoj havas sian gradon de mediumeco laŭ siaj plej variaj evoluaj pozicioj, kaj tiu spirita atributo ankoraŭ reprezentas la aŭroron de novaj perceptoj por la homo de la estonteco, kiam, pro la progreso de la monda intelekto, la homoj vidos plilarĝigi la malvastan fenestron de iliaj kvin sentumoj.

Sed nuntempe ni devas konfesi, ke sur la vasta kampo de la psikaj potencoj de la homo ekzistas ja mediumoj kun difinita tasko, pioniroj de la novaj homaj akiraĵoj. Estas vere, ke tiuj taskoj postulas oferemon kaj multfoje konsistas el krudaj provoj; se tamen la laboristo serĉas la evangelian substancon por la plenumo de siaj devoj, li efektive estas la laboristo, rajtanta aldonon da favorkoreco, promesitan de la Majstro al tiuj bonvolaj disĉiploj."



XAVIER, Francisco Cândido. "La Konsolanto". Diktita de la Spirito Emmanuel. El la portugala lingvo tradukis Esperanten Benedicto Silva. 1-a eldono en Esperanto. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 1977. § 383.

LORENZ

"KOMUNIKOJ"

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 40-a – n-ro 160 – Oktobro-Novembro-December 2015

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo

KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonoj: + 55-21-2221-2269 - + 55-21-2450-4768
Skajpo: Lorenz Editora | Fejsbuko: Editora Lorenz | Retadreso: editora_lorenz@uol.com.br
Retpaĝo: <http://editoralorenz.blogspot.com.br>



Kompostita de Rogério Mota

Internacia Infana Kongreseto Invitas



La 45-a INTERNACIA INFANA KONGRESETO (IIK) estas aranĝo por Esperantistaj infanoj inter 6 kaj 16 jaroj, kiu en 2015 okazis en Villeneuve-d'Ascq. Lige kun la 101-a UNIVERSALA KONGRESO en Nitro okazos la 45-a IIK. Logas favoraj prezoj por manĝoj kaj loĝigo, kaj estos krome ebleco por la infanoj dormi kun siaj gepatroj. La kongreso estos gvidata kaj organizata de internacia teamo, kiu konsistas el spertuloj pri zorgado pri infanoj kaj adoleskuloj. Retpaĝo enhavanta informojn kun prezoj, fotojn de la kongresejo, provizorajn programon kaj skipon estas konsultebla ĉe: <http://bertosch.free.fr/iik2016/>.

Laŭ la informoj de: GAZETARAJ KOMUNIKOJ DE UEA, N-ro 598 (2015-12-04).
TEJO AKTUALE, N-ro 419 (2015-12-11).



RADIO RIO DE JANEIRO: Programo "La Konsolanto"

La leĝoj de Dio, la Spiritisma logiko kaj la metodo de Allan Kardec estis la ĉefaj aferoj pritraktitaj en la Kristnaska elsendo de LA KONSOLANTO, unu el la novaj Esperantlingvaj programoj de RADIO RIO DE JANEIRO.

Krome elstaris la partopreno de la itala esperantisto RENATO CORSETTI, kiu esprimis simpatian por la temoj de la programo kaj por la Spiritisma Doktrino.

Muziko kaj poezio estas ankaŭ en tiu ĉi programo. Estis disaŭdigita la kanzono "Amo de Jesuo" kaj deklamiĝis Kristnaska poemo, mediume diktita de la Spirito Antoni Grabowski al la mediumo Francisco Valdomiro Lorenz. ★

La Konsolanto aŭskulteblas en:

http://www.radioriodejaneiro.am.br/?page_id=364

Informas Fabiano Henrique

<http://esperantoilustrita.blogspot.com.br/2015/12/radio-rio-de-janeiro-la-konsolanto.html>

BRAZILA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ-SPIRITISTOJ (BRES)

Ĝojege ni invitas vin al la 9-a BRES, kies ĉeftemo estos "SPIRITISMAJ VERKOJ – LUMO AL LA MONDO". Ĝi okazos en la urbo Manaus. La evento komenciĝos la 26-an de Januaro je la 6-a vespere. Prelegos dum la renkontiĝo la karaj samideanoj Licio de Almeida Castro, Givanildo Ramos Costa, João Silva dos Santos kaj Elmir dos Santos Lima. ★

Legu pli:

<https://www.facebook.com/Brazila-Asocio-de-Esperantistoj-Spiritistoj-162609523902699/>

9-a BRAZILA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ-SPIRITISTOJ

9-A BRES

Ĉeftemo:

SPIRITISMAJ VERKOJ · LUMO AL LA MONDO

**DATO: 26-a kaj 27-a de Januaro, 2016 -
Manaŭso, AM**

Realiganto:



Apogoj:



Renkontiĝejo:

Fundação Allan Kardec

Avenida Mário Ypiranga Monteiro (antiga Avenida Recife), 1.507
Bairro Adrianópolis

Pliaj informoj: baesbrazilo@gmail.com

Brazila Asocio de Esperantistoj-Spiritistoj

VERDA KOMUNIKADO: KIUN INTERNACIAN LINGVON ONI UZU EN DAŬRIPOVA MONDO?

51-A BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO
36-A BRAZILA ESPERANTISTA JUNULARA KONGRESO

Manaus, de la 22-a ĝis 26-a de Januaro 2016

Manaus estas brazila urbo proksime de la enfluo de rivero Negro en riveron Amazono. Ĝi situas nur kelkdek kilometrojn de la ekvatoro, kvazaŭ meze en ĝangalo (pluvarbaro) kaj havas ekstreme tropikan klimaton. Ĝi estis fondita en 1669 de portugalaj kolonizantoj. Pro la ebleco ekskursi sur la riveroj ĝi estas ŝatata celo de turistoj. Vidindaĵoj estas ekzemple la Urba Teatro, la Doganeja Domo, la Palaco de Justico kaj precipe la kunfluo de la du riveroj, nomata "renkontiĝo de la akvoj". Manaus havas du sezonojn, vintron (Januaro-Junio) kaj someron (Julio-December). Vintre, la klimato ĝenerale estas ĉirkaŭ 23°C kaj 30°C. Somere, ĉirkaŭ 30°C kaj 42°C. ★

Legu pli:

<http://esperanto.org.br/info/index.php/pages/kongresoj>

51-a Brazila Kongreso De Esperanto - BKE

Manaŭso - Amazonio,
22 - 26 januaro 2016

Apogantoj:

UEA
UNIVERSIDADE
DO ESTADO DO
AMAZONAS

PROEX
PROJETO DE EXTENSÃO
E ADAPTAÇÃO CURRICULAR

UFAM
UNIVERSIDADE FEDERAL DO AMAPÁ

UNICAP
UNIVERSIDADE DO CEARÁ

Ĉeftemo:

Verda Komunikado: kiun internacian lingvon oni uzu en daŭripova mondo?

Comunicação verde: qual língua internacional um mundo sustentável deve utilizar?

36-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso - BEJK

Universidade Estadual do Amazonas - UEA
Escola Superior de Ciências da Saúde
Av. Carvalho Leal, 1777 - Cachoeirinha
aeakomunikado@hotmail.com
www.aeesperanto.com

INSCRIÇÕES:
www.esperanto.org.br

INFORMAÇÕES:
☎ 092 99995-6910
092 98111-2572
092 99965-5657
061 3226-1298

☎ 92 99341-2672

Organizantoj:



Brazila Esperanto-Ligo
ekde 1907



EL LA EVANGELIO

KORPA PARENCECO KAJ SPIRITA PARENCECO



"Jen mia patrino kaj miaj fratoj! Ĉar kiu ajn faros la volon de Dio, tiu estas mia frato kaj mia fratino kaj mia patrino." Marko 3:34-35

La ligiloj de la sango ne starigas nepre la ligilojn inter la Spiritoj. La korpo devenas de la korpo, sed la Spirito ne devenas de la Spirito, ĉar la Spirito jam ekzistis, antaŭ ol la korpo fariĝis; la patro ne kreas la Spiriton de sia infano, sed nur liveras al li la korpan envolvajon; tamen li devas helpi ties intelektan kaj moralan kreskadon, por igi sian filon progresi.

La Spiritoj, kiuj enkarniĝas en unu saman familion, precipe ĉe proksimaj parencoj, plej ofte estas sin reciproke simpatiantaj Spiritoj, kunigitaj per antaŭaj rilatoj, kiuj manifestiĝas per inklinoj inter tiuj Spiritoj dum la surtera vivo; sed povas okazi, ke tiuj Spiritoj estas tute fremdaj unuj al aliaj, apartigitaj de antipatioj ankaŭ antaŭaj, kiuj montriĝas per ilia surtera antagonismo, kiu utilos al ili kiel provo. La

veraj ligiloj de familio ne estas do tiuj de la sango, sed tiuj de la simpatio kaj de la komuneco de la pensoj, kiuj unuigas la Spiritojn antaŭ, dum kaj post ilia enkorpora vivo.

Ekzistas do du specoj de familioj: la familioj laŭ la spirita ligilo kaj la familioj laŭ la korpaj ligiloj; la unuaj, daŭraj, fortiĝas per la puriĝo kaj eterniĝas en la mondo de la Spiritoj, tra pluraj migradoj de l' animo; la duaj, facilrompaj kiel la materio, estingiĝas kun la pasado de la tempo kaj ofte morale disiĝas jam dum la nuna vivo. ★

KARDEC, Allan. "La Evangelio laŭ Spiritismo". Tradukis Ismael Gomes Braga. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 2008. Ĉapitro 14, Respektu vian patron kaj vian patrinon. § 8.



Konsiliĝo

Aleksandro Porfirjeviĉ Logvin (1960)

Ĉu dezirinde eminenti,
grimpadi supren en la viv'
kaj fierege antaŭsenti
la senmortecon de l' arkiv'?

La cel' de l' kreo — la sindono,
ne kubutado por prosper',
nek memadora fanfaronado,
nek la ajn-kosta glori-kaper'.

Jes, tia estu nia vivo,
ke nin ne loĝu falsa fam',
kaj nin impulsu por aktivo
ne la memamo, sed homam'.

Ni gvidu tiel la vivkuron,
ke ni, post nia malaper',
en homaj koroj lasu spuron,
ne sur la flavo de l' paper'.

El la verko "Sur la Vivovojo: Poemoj", originale verkita en Esperanto de Aleksandro Porfirjeviĉ Logvin kaj eldonita de J. Régulo per BELETRAJ KAJEROJ de STAFETO, serio 24, en 1964.

LOGVIN, Aleksandro (1903-1980). Ukraino. Pri si mem, li skribis: "Mi estis laboristo, fervoja konduktoro, relŝanĝisto, kontoristo, metaltornisto, ĵurnalisto. Esperantisto de post 1923." Antaŭ 25-30 jaroj de la pasinta jarcento, li kontribuis al nia beletra, ĉefe per Heroldo de Esperanto, sub la plumnomo 'Liljer'. Post granda silento, denove ekpublikis en 1959.

**"La Libro de
la Mediumoj"
publikigita en
la japana**



La 19-an de Decembro alvenis en la merkaton la japanlingva eldono de **LA LIBRO DE LA MEDIUMOJ**, verkita de ALLAN KARDEC. En tiu entrepreno Esperanto ludis gravan rolon.

La traduklaboro komenciĝis antaŭ 30 jaroj, fare de la esperantisto SHIGEKI MAEDA, prezidanto de la japana religia institucio OOMOTO INTERNACIA. Ĝi estis farita surbaze de la Esperanta versio, tradukita de Porto Carreiro Neto kaj Ismael Gomes Braga, publikigita de BRAZILA SPIRITISMA FEDERACIO (FEB).

Per interreto, s-ro Maeda konigis, ke tiu libro jam povas esti mendita ĉe ĉiuj librovendejoj en Japanujo. Oni ankaŭ povas aĉeti ĝin per la retejo Amazon. ★

Informas Fabiano Henrique en la retpaĝo:

<http://esperantoilustrita.blogspot.com.br/2015/12/libro-tradukita-el-esperanto-alvenas-en.html>

POEMOJ EL LA PLI GRANDA MONDO

Respondo al ne justa kritikulo

Ne pensis mi respondi la "kritikon"
de l' homo, kiu diras, ke la lingvo
farita arte, kun la cel' humana,
jam mortis kiel venko de l' naturo;
sed kiel diris unu el l' amikoj,
respondi oni devas, se utile
por bono de l' afero sankta estas.
Do mi memorigante la laborojn
de la samideanoj faraditajn,
demandas: "Ĉu la lingvo Esperanto
ne konas la doloron, dramon, ĝojon,
esperon, lukton, stilon, belajn verkojn?
Ĉu ĝi aspekton havas nenaturan?"
Ho, vi amikoj, kiuj bone scias,
ke nia lingvo vivas, kreskas, sentas,
internan senson kaj ideon havas,
decidu mem, ĉu tiu kritikisto
la rajton havas tiel nin ofendi?
Pardonu lin estonta la homaro:
ĉar li ne sciis, ke li tre eraras.
Vivadas kaj vivados Esperanto,
trezoro ja neelĉerpeble riĉa
de sentoj, pensoj, laŭnatura arto!

17/10/1943



LORENZ, Francisco Valdomiro. "Voĉoj de poetoj el la spirita mondo". Poemoj rekte ricevitaj en Esperanto. Pluraj Aŭtoroj. Rio de Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio, 1987. 2-a eldono. p. 70.

Legu la libron "Voĉoj de poetoj el la spirita mondo" kaj plurajn aliajn en la jena adreso:

<http://www.febnet.org.br/blog/geral/estudos/download-elsutoj/>



QR CODE

Legu la libron "**Voĉoj de Poetoj
el la Spirita Mondo**"

kaj plurajn aliajn en la jena adreso:

<http://www.febnet.org.br/blog/geral/estudos/download-elsutoj/>

LORENZ, Francisco Valdomiro. **Voĉoj de poetoj el la spirita mondo**. Poemoj rekte ricevitaj en Esperanto. 2-a eldono. Pluraj Aŭtoroj. Rio-de-Janeiro: Brazila Spiritisma Federacio (FEB), 1987.



PAPO FRANCISKO EN KUBO: KELKAJ NOTOJ PRI AGRABLA VIZITO



Am finiĝis en Kubo la sukcesplena vizito de la SANKTA PAPO FRANCISKO. Tio estas fakto kaj kubanoj tre ĝojas kaj feliĉas pro tiu evento. La ankaŭ Episkopo de Romo restis ĉe ni kiel "Misiisto de Mizerikordo" dum kvar tagoj, ekde la 19-a ĝis la 22-a de Septembro. En tri kubaj urboj li gvidis sanktajn diservojn, ĝuste en Havano, Holguín kaj Santiago.

Ekde sia alveno mem kaj sia translokado 18-kilometra de la internacia flughaveno "José Martí" ĝis la Apostola Nuncio en Havano niaj homoj malsimilaj montris al tiu eminenta vizitanto korinklinon, respekton kaj gastamecon, kaj ankaŭ dum la ceteraj tri tagoj, tiuj elkoraj sentoj ĉiam kaj ĉie prezentiĝis ĉe ili.

Papo Francisko estas la unua katolika Ekleziestro laŭ deveno latinamerika kaj ankaŭ de la Jezuita Ordeno. Li alportis al niaj homoj amon al proksimulo, fidon, rekonon kaj saluton al la infanoj, maljunuloj kaj handikapuloj. La pastora vojaĝo estas la tria nialanden kaj ĝi inkludas ankaŭ Usono, kie li devas viziti tri urbojn. ★

El Havano, Kubo, informas Juan Carlos Montero Medina.